

Siegfried Einstein,
An den Herbst

tradukita de Manfred Retzlaff

O Maler Herbst, bleibe
noch ein bißchen hier.
Färbe das Blatt karminrot,
bis es vom Baum fällt.

Tauche die Pinsel in Farbe,
bemale alles mit Purpur,
und röte die Äpfel,
die Natur sei bunt.

Lasse den Schmetterlingen
Blumen und goldenes Licht;
Bilder der Sehnsucht und Fantasie
male mir.

Wenn du das Bild vollendet hast,
lasst uns deinen Wein trinken.
Fliehe, bevor gekommen ist
der winterliche Frost und das Eis.

...

Siegfried Einstein,
Al la aŭtuno

tradukita de Manfred Retzlaff

Ho pentrist' aŭtun', restigu
vin ankoraŭ tie ĉi!
La folion karminigu,
ĝis de l' arbo falas ĝi.

La penikojn enfarbigu,
pentru ĉion per purpur',
kaj la pomojn vi ruĝigu,
estu bunta la natur'!

Lasu al la papilioj
florojn, lumon oran vi;
de sopir' kaj fantazio
bildojn pentru vi al mi.

Se la bildon vi finintas,
trinku vian vinon ni.
Fuĝu, antaŭ ol venintas
vintra frosto kaj glaci'!

...

*Traduko de la Germana poemo “An den Herbst” de SIEGFRIED EINSTEIN (*1919-11-30 – †1983-04-25) en la Germanan de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2012-12-14.*

Arg-653-1314 (2012-11-14 11:01:58)

Wörtliche Rückübersetzung der Esperanto-Fassung

*Traduko de la Germana poemo “An den Herbst” de SIEGFRIED EINSTEIN (*1919-11-30 – †1983-04-25) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-653-1313 (2012-11-13 18:02:25)

Pri la aŭtoro vidu ankaŭ la retejon <https://sites.google.com/site/siegfriedeinstein/>.